

## KERo 2014 Intermontare en Viñales

MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

Por bildigi la tutan etoson de la 30-a Komitatkunsido de Kuba Esperanto-Asocio, oni devas diri ke kaptis nin de la 12-a ĝis la 16-a de marto la bela naturparko Viñales, kies verdo kaj freŝa aero provizis nin je unika naturmedio por labori kaj kleriĝi, strategii kaj promeni, plani kaj danci je la ritmo de tradicia kaj novtempa muziko kaj aparte de la arto per kiu regalis nin la kulturaj projektoj naskiĝintaj en ContraMaestre, Santiago de Cuba.

Ni parolas tutcerte pri sukcesa evento, nome, la 3-a Kuba Esperanto-Renkontiĝo KERo 2014 okazinta en la kampadejo Du Fratinoj en la plej okcidenta provinco, Pinar del Río.

La renkontiĝon partoprenis 147 kubaj geesperantistoj el 14 provincoj (entute estas 15) plus du rusinoj, unu kanadano kaj unu germano. KERo komenciĝis la 12-an per la komitata kunsido de KEA. Kiel planite, okazis elektoj de la Nacia Estraro. La elekta komisiono, kiu laboris dum tuta jaro por plenumi tiun taskon laŭ la statuta preskribo, estis prezidita de Graciela Morgado el ContraMaestre, Santiago de Cuba, kune kun José Luis Montes de Oca el Villa Clara kaj Norberto Díaz Guevara el Sancti Spiritus.

Kiel rezulto estis reelektita kiel prezidanto Alberto Fernández-Calienes por trijara mandatperiodo. La novelektitan estraron kompleti-

gas: Pedro Fernández Rodríguez, Maritza Gutiérrez González, Julián Hernández Angulo, Alberto Rodríguez Pineda, Juan Ramón Rodríguez Gómez kaj Miguel Ángel González Alfonso. La Nacia Komitato decidis ankaŭ kongrue al la nova strategia laborplano de UEA transsalti al novaj manieroj disdividi la laboron.

La evento inkluzivis la unuan tutlandan Seminarion por Aktivula Trejnado, kiun prizorgis Maritza Gutiérrez; okazis sukcesa sesio de KEA-ekzamenoj, konversacia kurso, radioamatoraj aranĝoj, kunsidis fakgrupo pri tradukado gvidita de Vilhelmo Lutermano, ankaŭ la Junulara Sekcio de KEA kunsidis. Ne mankis Interkona Vespere, alimaniere organizita de la gejunuloj, didaktikaj ludoj, sorobano kaj origamio, modparado, koncerto de la kuba ensemblo Amindaj, turismado kaj sporto. Ĉiuvespere estis vigla diskejo.

Pluraj homoj promenadis kaj ekskursis en la proksimeco kaj ĉiuj partoprenis la ekskursan tagon kiu portis nin al la kaverno de La Indiano, la belvidejo Los Jazmines kaj la vilaĝo-centro, kio ebligis al multaj kubanoj, ĉefe el la orienta parto de Kubo, unufoje viziti la faman valon Viñales, sendube unu el la plej belaj pejzaĝoj de nia kariba lando.

Je la fino, okazis la komuna fotado kiu niadorse montris la faman Murpentraĵon de la Prahistorio, sur monteto situanta je kelkcento da metroj de nia bela kampadejo, memorigante al ĉiuj la fakton ke ni loĝis en unu el la plej antikvaj regionoj de Kubo, laŭ la sciencistoj, temas pri rokoj el karsto el la Ĵurasia Epoko. Kaj multaj plorveis! Tiel la mondo estas, ĉio kio pluve komenciĝas, sune finiĝas!

Ni pasigis memorindajn tagojn, spite al plibonigendaj malglataĵoj kiuj nepre riĉigas ankaŭ nian spiriton. La adiaŭo trafis nin cerbumante la venontan renkontiĝon. Ĉu kongreso?! La sentoj ekflugas orienten... ĉu kongo? Ek!!!



# Centjariĝoj (II)

JUAN R. RODRÍGUEZ GÓMEZ

La 3-an de januaro 1914, la Kuba Societo de la Ruĝa Kruco investas d-ron Antonio Alemán Ruiz (unua prezidanto de Societo Kuba por la Propagando de Esperanto, SKPE) per la Ordeno je Honoro kaj Merito, pro lia laboro kiel instruisto de la membroj de tiu institucio, kion li faris tri jarojn antaŭe, kaj pro liaj kontribuoj kaj demarŝoj faritaj celante ke la Ruĝa Kruco utiligu Esperanton en sia kutima agado.

En januaro 1914, aperas la lasta eldono de *Cuba Esperantista* (oficiala organo de SKPE, fondita la 1-an de januaro 1910). Jen la frontpaĝo kaj sekve la lasta paĝo (4), kun portreto de d-ro Mariano Aramburo Machado, tiatempe prezidanto de tiu organo.

Por la unua flugo Cienfuegos-Havano, planita por la 24-a de februaro 1914, la esperantisto kaj filatelisto Andrés María Oliva y Cuevas pretigas specialajn kovertojn, kie aperas kelkaj klarigoj en la hispana, Esperanto kaj la angla lingvoj. En la dekstra parto (supre), tekstas: "Correo aéreo, aera poŝtvojo kaj Air Postway". La flugo, lastmomente, pro teknikaj kialoj, ne efektiviĝis en tiu dato (tio okazis la 20-an de majo) kaj oni sendis la koverton per fervojo.

**CUBA ESPERANTISTA**  
ORGANO OFICIAL DE LA SOCIEDAD CUBANA PARA LA PROPAGACION DEL ESPERANTO  
DIRECTOR: DR. ANTONIO ALEMAN RUIZ  
Industria 109, altos. Teléfono A-6974.  
APARTADO 1324.  
AÑO V. HABANA, ENERO DE 1914. N.º 1.


"KURAGE AL PACA LABORO"

**HONOROSA DISTINCION**

**CUBA ESPEKANTISTA**

**DR. MARIANO ARAMBURO Y MACHADO**  
Presidente de la Sociedad Cubana para la propagación del Esperanto.

Nació en Camagüey el 30 de Noviembre de 1870. Estudió primeras letras y segunda enseñanza en el Real Colegio de las Escuelas Pías de su ciudad natal, obteniendo el grado de Bachiller en 1888. Marchó ese año a España e ingresó en la Universidad de Zaragoza; allí cursó las Facultades de Filosofía y Letras, y Madrid en 1891 y en la Universidad Central de Madrid. Durante algunos años estuvo en la capital en importantes revistas y pronunciando charlas en el Ateneo y en otras doctas sociedades por unanimidad Académico Profesor. Vuelto a su elemento, recibió el apodofo de "El gusano" a España en 1901, permaneciendo "El cinco" hasta su fallecimiento por la Integridad, en el Hospital de Cienfuegos, el 20 de mayo de 1914. Fue el primer redactor de las "Mensajes Importantes", "La Discusión", el "Diario de la Marina" y que ha publicado figuras: "La personalidad Jigen, desarrollo y decadencia de la tragedia a Capacidad civil", "Monografía oratoria", etc.



## Membrovarbado: kerna laboro por la vivo de KEA

MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

Kadre de la tutlanda renkontiĝo KERo 2014 okazis la 30-a Komitatkunsido de KEA kie oni pritraktis ĉefe la laborrezultojn de la jaro kaj pli alrigardis la estontecon. Tiamaniere ni revuis la tutan jaron kaj decidis, ke estas esencaj taskoj plenumendaj en 2014; interalie, rilate membrovarbadon kaj novtipajn kursojn por komencantoj, daŭrigantoj kaj finintoj.

Oni pritraktis agadplanon laŭ la Strategia Laborplano de UEA kaj surbaze de niaj propraj spertoj, bezonoj kaj realigeblaj. Konkrete oni prezentis statistikon de la membraro ekde la jaro 2011 kaj la evoluon de tiu kategorio laŭ teritorioj. La potencialoj por 2014 estis ankaŭ kiel eble plej realisme starigitaj kun la celo labori por plenumi difinitajn nombrojn, sed ankaŭ konsciante pri la bezono transalti al pli kvalita laboro kaj plialtigo de la lingva nivelo.

Sendube estas necese forte kaj konstante labori por plialtigi la membronombro de KEA tutlande, konsciaj pri la bezono altiri la atenton de konkretaj celpublikoj: gejunuloj, universitatoj, fakuloj kaj prilingvaj interesitoj ĝenerale. Evidentas ke grandaj regionoj kiel Camagüey, Villa Clara kaj Holguín kiuj pasintec havis fortajn movadojn, potenciale multon povus kontribui al divastigo de Esperanto nialande.

	Teritorio / Kategorio	2011	2012	2013	2014
1	Pinar del Río	4	5	17	
2	Artemisa	1	1	1	
3	La Habana	219	193	197	220
4	Mayabeque	9	18	20	
5	Matanzas	2	20	14	
6	Cienfuegos	23	17	21	30
7	Villa Clara	4	23	36	40
8	Sancti Spiritus	1	3	1	
9	Ciego de Ávila		7	9	
10	Camagüey	7	5	2	
11	Las Tunas	1		2	
12	Holguín	20	10	32	35
13	Granma	55	44	45	60
14	Santiago de Cuba	75	101	110	120
15	Guantánamo	48	35	22	40
16	Isla de la Juventud	1	25	4	
	Honoraj Membroj	4	4	4	4
	Amikoj de Esperanto	66	22	25	
	<b>Totalo</b>	<b>540</b>	<b>533</b>	<b>562</b>	<b>549</b>



# 23-a Internacia Librofoiro en Santiago de Kubo

GONZALO COLLANTES GARCÍA

De la 5-a ĝis la 9-a de marto ĉijare, la Provinca Filio en Santiago de Kubo, sukcese partoprenis en la 23-a Internacia Librofoiro okazinta en la Kongresa Centro Heredia, kie oni montris al la publiko pli ol 50 ekzemplerojn de la E-literaturo kaj kelkajn fotojn pri la 95-a Universala Kongreso okazinta en Havano 2010. Oni informis al la interesitoj pri Esperanto kaj disdonis flugfoliojn. Deĵoris ĉe la stando Gonzalo Collantes García (Ĝenerala Sekretario kaj kunordiganto flanke de la Provinca Filio ĉe la Preparkomitato de la Librofoiro, kaj Julio César Tamayo Salas, Prezidanto). Partoprenis per arta prezento la muzikensemblo Amindaj kaj Fratoj El, akompanataj de du belaj knabinoj, Anika Sánchez Pacheco kaj Mirelis Castillo Pacheco, kiuj brile kantis.

Je la fino de la Librofoiro, la Provinca Estraro sendis dankleterojn al la Provinca Direktorino pri Kulturo, al la Direktorino de la Provinca Kulturdomo, al la direktoro de la Teatro Heredia, kaj ankaŭ al la estrino de Julio César Tamayo en la entrepreno RETOMED, ĉar ŝi entuziasme kaj afable faciligis la du standojn uzitajn por montri la librojn.

Ni proponis por la venonta Librofoiro 2015, okaze de la 500 jaroj de la fondo de la 7-a Vilaĝo Santiago de Kubo, prezenti la verkon: *Historia del Esperanto en Cuba 1904–1936*, de la aŭtoro Juan Ramón Rodríguez Gómez, kies antaŭparolon verkis la Historiisto de la Urbo, d-rino Olga Portuondo Zúñiga.



# Ne nur lecionoj de Esperanto sed ankaŭ de Amikeco

JULIÁN HERNÁNDEZ ANGULO

Invitite de s-ro Martin Schäffer, Ĝenerala Sekretario de UEA kaj prezidanto de Fondaĵo Esperanto Internacia, la 4-an de januaro mi vojaĝis al Nikaragvo por gvidi trisemajnan intensan kurson tie. Dum tiuj tagoj mi havis la ĝuon kaj ŝancon instrui Esperanton al dek unu nikaragvanoj, al kvin kostarikanoj kaj al germanino loĝanta en Managvo de antaŭ kelkaj jaroj, kiuj tre bone proprigis al si la enhavon de la kurso.

Pro tio ke la kurso estis ĉefe komunika, pluraj bazaj komunikaj funkcioj konsistigis ĝin. Mia celo estis kapabligi la ĉeestantojn tiel ke ili atingu nivelon B1 laŭ la Eŭropa Referenckadro. La ofteco kaj intenso de la kurso kaj la trajtoj de ties partoprenantoj igis min daŭre eksperimenti surbaze de miaj spertoj. Jen duope, jen triope, jen tutgrupe la lernantoj demandis, respondis, priskribis bildojn kaj sinprezentis. Ili ne nur lernis kaj praktikis gramatikaĵojn sed uzis la lingvon kiel komunikilo por esprimi diversajn ideojn kaj opiniojn. Ili ankaŭ alproksimiĝis kaj konatiĝis kun kelkaj elementoj de la historio kaj kulturo de Esperanto. Pro tio ke ne facilis plani seshoran instruadon de lundo ĝis vendredo, mi elpensis variajn kaj viglajn lecionerojn por teni la dinamikon kaj motivigon de la leciono altaj kaj por garantii agrablan lernadon.

Ĉiam regis tre bona etoso, kio ebligis fluan komunikadon kaj opiniinterŝanĝon. Ĉiuj sentis sin hejme ĉar estiĝis plej bonaj rilatoj inter ni. Ne mankis prikulturaj konversacioj, ŝercoj, kantoj kaj gitarludado. Ni ankaŭ promenis al Parko Salvador Allende en akompano de kelkaj familianoj kaj pasigis belan sabaton en tiu urbocentra parko. Tre entuziasme ni preparis kulturen prezentadon por la Unua Internacia Nikaragva Kongreso, kiu okazis de la 24-a ĝis la 27-a de januaro en provinco Granada. Dudeko da alilandaj esperantistoj partoprenis ĝin. Danke al la agado de Martin, Uriel Gurdián, María de los Angeles kaj Eliette, kiuj tre bone organizis kondiĉojn por la kurso, ĉio iris glate.

Dum la lastaj tagoj de la kurso kaj poste dum la kongreso, la lernantoj havis la ŝancon praktiki kaj paroli la lingvon kaj senti sin parto de internacia komunumo. Ili partoprenis kaj ĝuis la kongresajn programerojn kio sendube multe entuziasmigis kaj plimotivigis ilin. La programo inkluzivis prelegojn, seminarion por aktivuloj, konversacian rondon, ekskursojn al vulkanoj kaj insuletoj, distran kaj artan vesperojn, ktp. La amikeco konstruita kaj kulturita de Leslie, Marlon, María de los Angeles, Rocío, Carolina, José Paulo, Fernando, la nikaragvano, Massiel, Rodolfo, Maritza, Roberto, Fernando, la kostarikano, Claudia, César kaj ni, Martin, Uriel kaj mi, Julián, estis tre bela kaj valorplena. Mi esperas, ke la nikaragva esperantista movado fariĝu pli forta kaj faru sian kontribuon al la regiona kaj monda movado.



## Trejnado: kiel verki artikolojn por la gazetaro

### Esperanto inter montetoj

De la 12-a ĝis la 16-a de marto, Kuba Esperanto-Asocio okazigis la 3-an Kuban Esperanto-Renkontiĝon en la kampadejo Du Fratinoj, kiu situas en la plej okcidenta provinco de nia insularo; la Nacia Komitato, la plej alta instanco de la Asocio kunsidis por kune analizi la laboron faritan dum la pasinta jaro.

La kampadejo situas en la valo Viñales, belega loko pro la rondaj pintoj kiuj identigas la regionon; 147 geesperantistoj el 14 provincoj partoprenis en familia etoso kaj ĝuis la belecon de la loko kaj renkontis kun samideanoj aŭ konatiĝis kun novaj membroj.

En agrablaj kunvenetoj la samideanoj planis taskojn por la estonteco. Oni pretigis buĝeton; oni analizis la manieron fari pli bone la laboron en diversaj agadkampoj, ĉefe en instruado, komunikado kaj trejnado de aktivuloj. Ne mankis distriĝo kaj amuziĝo ankaŭ ĉar la kampadejo estis taŭga kaj komforta tiucele. Ni ĉiuj esperas, ke denove okazos aranĝoj egalaj al ĉi tiu KERO, kiuj unuigas la esperantistojn kaj plifortigas la Esperanto-Asociacion en Kubo.

Raportis: MARTA ALONSO kaj CIRILO RAMOS

*Kiel konkreta rezulto de la seminario por aktivula trejnado okazinta en KER-o 2014, sesio kiun partoprenis 19 geesperantistoj, mi prezentas al vi la du plej bonajn tekstojn verkitajn kiel ekzerco.*





# Tra la spuroj de niaj klasikuloj

Maritza GUTIÉRREZ GONZÁLEZ



## Rimletero xxxxxx

de Marjorie BOULTON  
al William AULD  
sendita 25.XI.1953

Marjorie Boulton

Por ke ni vivu, kun espero  
ke lante kreskas la flugiloj –  
certe tra pentoj kaj humiloj  
sed ankaŭ per alia vero;

de viva bono iu ero  
floras en ĉiu el la miloj;  
por ke ni vivu, kun espero  
ke lante kreskas la flugiloj;

per arto, amo kaj sincero  
laboru ni, simi-gefiloj,  
tra la doloroj, malfaciloj,  
pli en kompatato ol kolero –  
por ke ni vivu kun espero.

(El: la nica literatura revuo,  
3/2 p. 80)

Marjorie Boulton, naskiĝis la 7-an de majo 1924, anglino. Ŝia verkaro ampleksas poeziaĵojn, dramojn, novelojn, rakontojn kaj eseojn. Krome ŝi tradukas. Esperanton ŝi eklernis en 1949. Membro de la Akademio de Esperanto. Honora membro de UEA. La verkado de Marjorie Boulton estas matura kaj socie engaĝita. Ĝin trapenetras varma tono kaj sincero. Evidentas ankaŭ ŝia impulsa formtro-

va kapablo kaj sento pri humuro. El la propra intimo ŝi lasas aperi siajn pasiojn kaj turmentojn, tiel nudigante antaŭ la leganto sian animon. Aliflanke per verkoj emoci-lirikaj ŝi prezentas kaj defendas sian idealisman humanismon. Inter ŝiaj plej elstaraj kaj konataj verkoj estas *Kontralte* (poemoj, 1955), *Rimletero* (korespondaĵoj kun William Auld, 1976). Ŝi pasio estas granda amo al la katoj.

## Radioamatoroj en Viñales

JAVIER RAMOS NISTAL

Kiel ĉiujare KERo (Kuba Esperanto-Renkontiĝo) fariĝas la plej grava aranĝo por la kubaj esperantistaj radioamatoroj, ĉifoje ĝi arigis 13 esperantistajn radioamatorojn el 6 provincoj kaj 8 lokajn radioamatorojn kiuj vizitis nin. Post longa kaj memstara organizado de la radia aranĝo kadre de KERo 2014 ni revenas hejmen kun ĝojo, malgraŭ tio, ke ni ne sukcesis kontakti esperantistojn, ja okazis fluaj kontaktoj kun radioamatoroj el multaj eŭropaj kaj amerikaj landoj.

Plibonigendas partopreno de niaj radioamatoroj dum aktivado de la radiostacio; por akiri spertojn oni bezonas aŭskulti kaj paroli per radio, ĝuste pro tio, por la venontaj radiamatoraj renkontiĝoj ni invitas ĉiujn aktive partopreni.

Fermín (CO9OKL) venis al Havano 2 tagojn pli frue por helpi al Javier (CL2MM) dum malmuntado de antenoj kaj transportado de kabloj, radioj kaj ceteraj teknikaĵoj. Ni alvenis al la kampadejo la 12-an de marto, sed tro malfrue tiel ke eblis nur elekti ka-

banon kaj esplori la lokon kaj kondiĉojn por muntado de antenoj. La 13-an ni tuj muntis la dupolusan antenon kaj la 20-metran K-antenon, kiu bedaŭrinde ne tre efike funkciis.

La testoj por la longkabla (*longwire*) anteno ne okazis pro tempomanko kaj nebona tersistemo, espereble en la estonteco ni ekuzos aliajn antenojn pri kio ni akceptas rekomendojn.

En 40 metroj per la dupolusa anteno ni sukcesis kontakti 45 radioamatorojn el pluraj eŭropaj kaj amerikaj landoj. Krome ni kontaktis 120 kubanojn en la frekvencoj HF kaj VHF. Helpo venis de la lokaj radioamatoroj el la Radio-Klubo de Viñales, kiuj vizitis kaj gvidis nin dum la grimrado al la Prahistoria Murpentraĵo por okazigi radian aranĝon en la 2-metraj frekvencoj tiel ke partoprenu pli da kubanoj. Danke al la helpo de Casabella (CL1JA) ni elsendis en ŝia domo per la ripetiloj 145.110 (Provinco Artemisa), 145.150 (Viñales) kaj 145.410 (urbo Pinar del Río).

La 14-an okazis kunsido de radioamatoroj kaj elekto de nova estraro. Interalie ni decidis okazigi 3 radiajn aranĝojn jare kadre de venontaj kubaj E-renkontiĝoj: 6-a Kongreso de KEA (Santiago de Cuba, marto 2015); Zamenhofa Metiejo (Guantánamo, decembre 2015); Centra E-Renkontiĝo (Cienfuegos, 2015).

La nuna elektita estraro kiu oficos dum tri jaroj estas: Javier Ramos Nistal (CL2MM), Prezidanto; Yordán Fonseca Olivera (CL2YGO), Ĝenerala Sekretario; Heberto García Fonseca (CL6HG), Tekniko; Juan Carlos Montero Medina, (Informado kaj Eksteraj Rilatoj); Omar Martínez Pérez (CL2KGB), Kunordiganto; Fermín Duany Rojas (CO9OKL), Kunordiganto; Guillermo Navarro Toledano (CO8WG), Landa reprezentanto de ILERA.

La nomo de la grupo restos KLERa (Kuba Laborgrupo de Esperantistaj Radioamatoroj). Ni akceptis kelkajn vizitantojn, inter la plej elstaraj, estis la prezidanto de la provincaj radioamatoroj Pedro (CO1HA), kiu ĉeestis dum elsendoj kaj interŝanĝis kun la prezidanto de KEA Alberto Fernández-Calienes Barrios kaj Miguel Ángel González Alfonso, novelektita estrarano de KEA.

Dum la fermo de KERo 2014 Javier (CL2MM) raportis detale pri KLERa. Eble dum junio ni denove estos kontakteblaj en la etero sed tutcerte en decembro 2014 ni estos aktivaj en la konkurso **ARRL 10 m Contest** kaj en ĉiuj HF-frekvencoj. Ĝis tiam! 73 kaj DX de la teamo CO9AAA (Voksigno de la Radia Aranĝo dum KERo 2014).



Kunsidas la estraro de KLERa. Dekstre, elsendas la radiostacio CO9AAA. Fone videblas sendricevilo FT-80, nutrilo FP700, komputilo kiu rulas la programon MixWin.



# Pri la lasta ekzamensesio de Kuba Esperanto-Asocio

JULIÁN HERNÁNDEZ ANGULO

Kadre de la 3-a Kuba Esperanto-Renkontiĝo (KERo), la landa ILEI-Sekcio okazigis bazan kaj mezan ekzamenojn de KEA. La kvin kandidatoj kiuj ekzameniĝis en la meza nivelo sukcesis, kaj el ok ekzameniĝintaj en la baza, sep sukcesis. Entute dek tri esperantistoj ekzameniĝis: Alexander Martínez Agüero, Carmen Dubel Lachaignerais Popa, Anyer Montero Ramos, Wilfredo Díaz Hernández kaj Frank Cedeño Estrada (Granma); Juan Carlos Montero Medina, Geomar Martínez Pérez, Ismael Pedro Ortega Iber, María de los Angeles Cartaya Martínez kaj Olga Lidia Barrios Cunningham (Havano); Raisel García (Santo Domingo), Villa Clara; Alina Zuaznabal Himely (Cienfuegos), kaj Guillermo Navarro Toledano (Santiago de Cuba).

La Sekcio tre dankas la sintenon de la ekzameniĝintoj ĉar ili jam montris intereson plialtigi sian lingvan nivelon kaj komunikan kompetenton. Ni instigas ilin mediti pri la eraroj faritaj kaj eltrovi strategiojn por forigi ilin. La distanca kurso povus esti unu

el la rimedoj por akompani ilin perfektigi la lingvajn konojn. Ni invitas la sukcesintojn de la Baza Nivelo prepari sin por la venontaj ekzamensesioj kiujn ni planas okazigi dufoje jare en la estonteco. Esprimi al tiuj kiuj trapasis la mezan, ke tio estas ja komencĉtupo por la senĉesa progreso.

La kuba esperantista movado bezonas ke pli da membroj komprenu la gravecon posedi la lingvon kaj ke tio nur eblos per daŭra studado, engaĝiĝo kaj sinalproksimiĝo al ĝi. Alstrebo al pli superaj celoj kaj pli malpli samnivela evoluo en ĉiuj filioj kaj grupoj realiĝos se ĉiu esperantisto fariĝas lingva kompetentulo kaj konanto de la historio kaj kulturo de nia movado. Mi certas ke gvidantoj de la Sekcio kaj instruistoj pretas helpi ĉiujn kiuj alproksimiĝos dezirante iĝi pli bona Esperanto-posedanto kaj parolanto kaj vere bona esperantisto. Ni longe sopiras ke dum niaj eventoj, kongresoj, aranĝoj kaj renkontiĝoj pli da partoprenantoj parolu kaj uzu la lingvon.

Kuba Esperanto-Asocio  
Apartado 5120, 10500 La Habana, Cuba  
+53 7 640 4484  
info@esperanto.cu.cu  
www.esperanto.cult.cu



Ĉu vi jam pagis  
vian kotizon por 2014?

Fariĝu Membro-Subtenanto!



**RADIO HAVANO KUBO**

Kurtondaj kaj retaj elsendoj

[www.radiohc.cu/eo](http://www.radiohc.cu/eo)



**esperanto.cu** estas trimonata eldonajo por komitatanoj, estraranoj kaj aktivuloj de KEA. Reta versio elŝuteblas de nia retejo [www.esperanto.cult.cu](http://www.esperanto.cult.cu). **Redaktis:** Maritza Gutiérrez, Alberto F. Calienes, kaj Javier Ramos.  
**Enpaĝigis:** Y. Mayol kaj Alberto F. Calienes.

